

Esperanto Somera Festivalo

Shallowford House

24-28a aŭgusto, 2015

Gvidas: Jack Warren

Gastgvidanto: Paul Gubbins



Ŝalofordo estas belega loko por somera festivalo: kampara domo, ĉirkauita de belaj kaj trankvilaj ĝardenoj, proponanta komfortajn ĉambrojn, bongustajn manĝaĵojn kaj la eblon dum kvin tagoj pensi, paroli kaj vivi en la internacia lingvo. Krom intensa studado en malgrandaj grupoj, estos muziko, ludoj en- kaj eksterdomaj kaj ekskurso al la Esperanto-Domo en Barlastono. Venu al ni por ĝui studferion neforgeseblan.

- Jack Warren

Ĉe la Somera Festivalo



Jack Warren esperantistiĝis en 1987. Li studis literaturon, lingvistikon kaj lingvojn en Londono, Manĉestro kaj Novkastelo kaj dum jardekoj instruis lingvojn al plenkreskuloj. Li redaktas la jorkŝiran revuon *La Blanka Rozo*, prelegas ĉe regionaj eventoj kaj kontribuas artikolojn al la tutlanda revuo *La Brita Esperantisto*.

“En la **progresanta** grupo studentoj plifortigos sian komprenon de Esperanto per diversaj lingvaj ekzercoj. Tiuj estos precipe parolaj kaj ankaŭ celos amuzon. Inter kromaj temoj pritraktataj estos naturo, lavado de vestoj kaj kiel trovi la ĝustan vojon en fremda urbo - aŭ flughaveno.”



Pliaj ebloj

Se vi dezirus ripozan semajnon en kvieta ĉirkaŭaĵo, vi estus tre bonvena veni al Shallowford por simpla *feriuma semajno*, kunvenante kun la grupo por manĝi kaj la distra vespero.

Paul Gubbins estas esperanto-aŭtoro, redaktoro, ĵurnalisto kaj instruisto, membro de la Akademio de Esperanto kaj prezidanto de Esperanto-Asocio de Britio.

Paul studis lingvojn (precipe la germanan) ĉe la Universitato de Manĉestro, Anglujo, kaj ĉe Queen's University, Kanado, kie li doktoriĝis pri germana literaturo en 1978.

Li laboris profesie kiel ĵurnalisto;

poste kiel lingvo-instruisto ĉe universitato en nord-okcidenta Anglujo. Li esperantistiĝis en 1984 kaj komencis kontribui artikolojn al la internacia revuo *Monato* en 1986. En januaro 2011 li iĝis ĉefredaktoro.



“En la progresinta grupo ni pritraktos diversajn tekstojn de vidpunkto kaj de gramatiko kaj de enhavo. La tekstoj inkluzivos aktualaĵojn, ĉu pri mondaj, ĉu pri esperantaj aferoj, ĉerpitajn ĝenerale el revuoj kaj magazinoj. Ni esploros kelkajn aspektojn de esperanta literaturo, ekzemple surbaze de mallongaj poemoj. La celo: konversaciigi kaj, super ĉio, amuziĝi.”



- Ni uzos la kroketejon (laŭ bonpermeso de la veterdijoj).

- Ni kantos, do kunportu viajn petojn.

- Vesperludoj disponeblas, inkluzive de la ĉiam populara surplanka Skrablo!

- Kunportu muzikilon aŭ helpilon se vi dezirus koncertumi aŭ distri.

Kosto

£295.20

inkluzive de ĉiu manĝo post alveno la lundon kaj antaŭ foriro la vendredon - sub-26 jaraĝuloj rajtas peti financan helpon ĉe **nojef.org**

Kiam

Alveno kaj registrado okazas lundon je la 12:00. Lunĉo sekvas. Foriro okazos post lunĉo vendredon.

Kiel atingi

Per trajno iru ĝis stacidomo Stafford. Poste vi bezonos taksion. Kontakti Viv por aranĝi taksion kaj dividi kostojn kun aliaj.

Kiel mendi lokon

- Sendu ĉekon al EAB ĉe Esperanto House, Station Road, Barlaston ST12 9DE
- Sendu retmesaĝon al Viv ĉe eab@esperanto.org.uk por ricevi ligon por interrete pagi.

La kotizo kovras tranoktadon kaj ĉiujn manĝojn kaj refreŝigaĵojn, malpezan matenmanĝon, dupladan tagmanĝon kaj tripladan vespermanĝon, matenkafon kaj posttagmezan teon.

Troviĝas trinkejo kun televidilo kaj retaliro tra la tuta konstruaĵo.

La 55a ĉiujara Esperanto
Somera Festivalo:
Shallowford House
Shallowford
Stone
Staffordshire
ST15 0NZ

